

La Hodiaŭa Ĵurnalo

2018-01-10

n-ro 412

Steven BREWER volas
montri la utilon de
Esperanto al Global Voices



Ĉinujo: Human Rights
Watch kondamnas la
ŝokajn terapiojn por
«konverti» la
samseksemulojn

Sud-Koreio kaj KDPR
komencis altnivelan
intertraktadon en
Panmunjom

Usono finos protektatan
statuson al proksimume
200 mil salvadoranoj

La Hodiaŭa Ĵurnalo

Ĉiutaga publikaĵo kun novaĵoj, aktualaĵoj kaj diversaĵoj – pri la mondo, scienco, socia vivo kaj Esperantujo.

Misio

Prezenti interesajn ĉiutagajn publikaĵojn por oportuna legado

Redaktoro

kaj grafikisto: Rafael S. Lima

Revizianto: Andrej A. Peĉenkin
[Андрей А. Печенкин]

Kontakto

hodiauajurnalo@gmail.com

Sendu viajn aktualajn novaĵojn, en Esperanto, kaj vi verŝajne trovos ilin en la ĵurnalo.

La redakcio ne nepre subtenas iujn enhavojn aŭ samopinias kun ties aŭtoroj.

Elŝutu la dosieron, la fontoj, la ligiloj kaj la enhavlisto estas alklakeblaj.



Farita per:



Scribus
Open Source Desktop Publishing

Sud-Koreio kaj KDPR komencis altnivelan intertraktadon en Panmunjom

En la armistica vilaĝo p. 03

Usono finos protektatan statuson al proksimume 200 mil salvadoranoj

18 monatoj por certigi ordan transiron p. 03

Ĉinujo: Human Rights Watch kondamnas la ŝokajn terapiojn por «konverti» la samseksemulojn

Insultoj, elektroŝokoj, medikamentoj p. 04

Steven BREWER volas montri la utilon de Esperanto al Global Voices

Informadoj de civitanoj el la tuta mondo p. 06


Hodiaŭe

Aleksej Nikolajeviĉ TOLSTOJ; Annette VON DROSTE-HÜLSHOFF; Wiesław KAZANECKI; kaj Birdo p. 09

Sud-Koreio kaj KDPR komencis altnivelan intertraktadon en Panmunjom

La Sud-korea Ministerio pri Reunigo diris, ke Sud-Koreio kaj la Korea Demokratia Popola Respubliko (KDPR) marde [09 jan 2018] komencis altnivelan interregistaran dialogon en la armistika vilaĝo de Panmunjom.

La du flankoj komencis la plenan kunvenon je ĉirkaŭ la 10-a horo laŭ la loka tempo kun kvin-membra Sud-korea delegacio sub la gvidado de ministro pri reunigo CHO Myoung-



gyon, kaj kvin delegitoj el la KDPR, estrataj de Ri Son-gwon, prezidanto de la Komitato por la Paca Renunigo de la Patrujo.

La Sud-korea novaĵ-agentejo Yonhap raportis, ke la ĉefdelegito de la KDPR diris, ke li esperas valorajn rezultojn el intertraktado kun Sud-Koreio.

Antaŭ ol foriri por la dialogo, la Sud-korea ĉefdelegito diris al raportistoj, ke li alfrontos la kunvenon trankvile kaj senhaste por fari la Vintrajn Olimpikojn de 2018 pacaj festoj kaj fari la unuan paŝon por plibonigi la interkoreajn rilatojn.

Yu
Ĉina Radio Internacia

Usono finos protektatan statuson al proksimume 200 mil salvadoranoj

La usona Ministerio pri Enlanda Sekureco diris lunde [08 jan 2018], ke la Usona registaro finos la provizoran protektatan statuson, kiu permesas al proksimume 200 mil homoj el Salvadoro resti laŭleĝe en Usono dum preskaŭ 17 jaroj.

Tamen, Usona Ministro pri Enlanda Sekureco Kirstjen NIELSEN diris, ke ŝi pluvalidigos ĝin por pliaj 18 monatoj ĝis la 9-a de septembro 2019 por certigi ordan transiron.



La decido renversis la nunan staton, kiu ekzistis ekde 2001, kiam la tiama prezidento George W. BUSH donis provizoran protektatan statuson al salvadoranoj, kiuj estis en Usono, post kiam grandaj tertremoj trafis la latin-amerikan landon.

La Ministerio pri Enlanda Sekureco diris en gazetara konferenco, ke la problemoj kaŭzitaj de la tertremoj jam ne ekzistas plu kaj ĉi tiuj salvadoranoj devas uzi la 18-monatan prokraston por iri el Usono aŭ serĉi alian anstataŭan statuson kiel laŭleĝaj enmigrintoj en Usono.

Yu
Ĉina Radio Internacia

Ĉinujo: *Human Rights Watch* kondamnas la ŝokajn terapiojn por «konverti» la samseksemulojn

Tio okazas en Ĉinujo, en 2017. LUO Qing, WEN Qi aŭ LIU Xiaoyun estis enfermitaj en kuracaj establaĵoj por «resanigi» sian samseksemon. En raporto publikigita la 15-an de novembro, *Human Rights Watch* (HRW) raporte kondamnas la «konvertajn terapiojn», kiuj celas la samseksemulojn en Ĉinio.

Efektivigataj pete de la familioj, tiuj praktikoj estas supozataj «revenigi ilin al aliseksemo». Tiu «terapio» estas maloftege konsentita de la koncernataj personoj. En 17 personoj pridemanditaj de HRW, ĉiuj insistas pri la familiaj kaj sociaj premoj, pro kiuj ili suferis.

«La psikiatro diris al mia patrino: samseksemo estas kiel ia ajn alia mensmalsano, kiel depresio, anksio aŭ dupolusa perturbo. Tio estas resanigebla. KREDU min, lasu lin ĉi tie: li estas en fidinda medio», rakontas WEN Qi al HRW. La psikiatro akiris sukceson. Same kiel la aliaj atestantoj, WEN Qi estis devigita sekvi «kuracadon», detenita en malsanulejo, sen ebla fuĝo.

KIAM LUO Qing, alia viktimo de tiuj terapioj, provis fuĝi. Li estis perforte rekaptita. «Mi proksimiĝis tre proksime al la pordo, kiu ne estis gardita, sed antaŭ ol mi povis malfermi ĝin, du sekuragentoj kaptis min. Tuj poste, mi troviĝis surgrunde», rakontas LUO Qing. Same kiel la aliaj atestantoj cititaj en la raporto, li preferas konservi anonimecon.



Insultoj, elektroŝokoj, medikamentoj

WEN Qi tamen havis multegajn kialojn por deziri fuĝon. La pacientoj rakontas, ke ili suferis pro traktadoj per medikamenta trudnutrado, elektroŝokoj, insultoj kaj humiligoj. «La flegistino donis al mi po du pilolojn tage. La kuracisto diris, ke tio estas kontraŭ la simptomoj de depresio kaj dupolusa perturbo. Li diris, ke ili havas sedativan efikon, kaj helpas min elteni miajn angorojn kaj kvietigi min [...]. Sed mi ne estas angora persono. Do kial ili donis al mi la medikamentojn?», plu demandas sin WEN Qi.

Ankaŭ kvin atestantoj rakontas, ke ili suferis pro «terapio» per elektroŝoko. Stimulitaj per bildoj aŭ videoj de samseksemaj agoj, ili ricevis samtempe elektrajn malŝargojn. La pacientoj tiamaniere, estas supozataj asociigi sian samseksemon al dolorigaj sensacioj, cele al nuligo de iliaj seksimpulsoj al samseksaj personoj.

«Ili intensigis la elektroŝokojn, kaj anstataŭ simpla rigidigo, mi eksentis doloron. Ŝajnis, ke nadloj trapenetris mian haŭton. Kelkajn minutojn poste, mia korpo ekstremeris... Nur poste mi komprenis, ke tio estas elektroŝokmaŝino», memoras LIU Xiaoyun.

«Ĉu vi pensis pri tio, kion diros viaj gepatroj?»

Kiam la elektroŝokoj fariĝas neelteneblaj, la traktado estas kelkfoje kompletigata per medikamentaj injektoj. «La kuracistoj devigis min spekti pornografiajn geajn filmojn, kaj samtempe flegistino injektis al mi likvaĵojn sub la haŭto, ofte en la brakon... Rapide, mia korpo komencis bruli. Mi naŭzis dum la tuta seanco, sed mi ne sukcesis dormi. Ankaŭ mia kapo doloris min. Sed la kuracistoj diris al mi, ke mi kvietigu kaj plu rigardu la ekranon», rakontas ZHANG Zhikun.

La kuracistoj tute ne havis kunsentemon. Ĉiuj atestantoj asertas, ke ili suferis premojn. AL Zhikun, la «terapeŭto» diris, ke samseksemo estas «malmorala» kaj malutila por sano. La kuracisto diris al mi: «Se vi ne ŝanĝiĝos, vi malsaniĝos kaj mortos pro aidoso. Via familia vivo neniam estos feliĉa... «Ĉu vi pensis pri tio, kion diros viaj gepatroj?»

Kontraŭleĝaj terapioj

Tiuj rakontoj pensigas pri la filmo «*One Flew Over the Cuckoo's Nest*» aŭ «*A Clockwork Orange*». Tamen ni estas en 2018 kaj ne en la 1960-aj jaroj ; tio okazas en agnoskitaj hospitaloj, koncernas pacientojn, kiuj ne estas malsanaj, kaj en lando, kie tiuj «konvertaj terapioj» ne estas laŭleĝaj.

Pekino tamen oficiale detiris samseksemon el la deliktoj de la Punkodo en 1997, kaj el sia listo de mensmalsanoj en 2001. De post 2013, la leĝo pri menssano ankaŭ postulas, ke diagnozo kaj traktado de la mensaj perturboj respektu la fundamentajn rajtojn de la individuoj kaj homdigneco.

Tamen, la aŭtoritatoj adoptis neniun aranĝon kontraŭ la sanaj establaĵoj, kie kuracistoj proponas tiujn konvertajn traktadojn. Koncerne la viktimojn, ili oftege rifuzas plendi, ĉar ili timas, ke ilia seksorientiĝo estos publikigita.

Du aferoj tamen iom evoluigis la situacion: en la unua, hospitalo estis kulpigita pro enŝlosado de plendanto. En la dua, viro akiris domaĝkompensojn pro la fizikaj kaj psikologiaj suferoj, kaŭzitaj de la elektroŝokoj. Sed tiuj juĝaj decidoj ne ankoraŭ havis malinstigajn efikojn nek al la kuracistoj, kiuj praktikas konvertajn terapiojn, nek al la familioj.

Neniam Milito Inter Ni

Steven BREWER volas montri la utilon de Esperanto al *Global Voices*

Post kvar jaroj da sindediĉa laboro HIROTAKA Masaaki (Vastalto) forlasis sian taskon kiel la redaktoro de la Esperanta versio de la monda blogaro *Global Voices* [Voĉoj de la mondo]. La nova redaktoro estas Steven BREWER. Laŭ li ĝuste per Esperanto *Global Voices* povus vere atingi siajn celojn.



Global Voices estas internacia reto de blogantoj, tradukantoj kaj civitanaj ĵurnalistoj, kiuj raportas pri la evoluoj en la blogosfero diversloke en la mondo. Laŭ sia manifesto, *Global Voices* celas "kune alporti al vi la informadojn de civitanoj el la tuta mondo, kun emfazo sur voĉoj kiuj ordinare ne aŭdiĝas en internaciaj gravaj gazetaroj".

La anglalingva reto estis fondita en 2004, kaj en 2007 al ĝi estis aldonita la projekto *Lingua*, kiu celas disvastigi la enhavon de *Global Voices* en aliaj lingvoj, helpe de volontulaj tradukistoj. Komence de novembro 2013 ekfunkciis la Esperanta versio, sed jam post kelkaj semajnoj ĉesis aktivi la nikaragva redaktoro Uriel GURDIÁN.

Tiam la torĉon transprenis HIROTAKA Masaaki (Vastalto):

– En oktobro 2013 mi aliĝis al *Global*

Voices en Esperanto (GVE), kiu ĵus naskiĝis, invitive de mia malajzia amiko, kiu ŝajne estis unu el la unuaj membroj de GVE. Komence mi tradukis plurajn afiŝojn, sed tuj poste oni anoncis eksigon de la tiama redaktoro de GVE. Konsiderante la situacion, mi decidis preni la postenon de kunredaktoro por ne mortigi la ĵusnaskitan GVE.

Kial vi opiniis la projekton grava?

– *Global Voices* kaptas voĉojn de civitanoj en diversaj lingvoj kaj kulturoj tra Interreto, kiuj ofte estas neglektataj de ĉefluaj amaskomunikiloj, kaj kunhavigas ilin per

diverslingvaj tradukoj. Mi ŝatas paroliberecon kaj subtenas komunikadon trans kulturoj kaj lingvoj, kiu estas deklarita en la Manifesto de *Global Voices*. Fakte la angla estas uzata kiel laborlingvo kaj pontolingvo en ĝia sistemo, sed, laŭ mi, Esperanto devas esti uzata pli ofte en tiu kampo.

Kiaj estas viaj pozitivaj kaj negativaj spertoj?

– Antaŭ ĉio, mi dankas ĉiujn kunlaborantojn de GVE, sen kiuj mi ne povus tenadi la retejon. Sume 26 tradukistoj-aŭtoroj kontribuis per 214 afiŝoj dum tri jaroj. Tio ĉi estas tre modesta nombro kompare kun mia idealo. Sed mi havas esperon, ke ĝi vigliĝos iom post iom en la venontaj jaroj.

– Unu el niaj tradukistoj bonŝance havis apartan grupeton por konsulti pri siaj

tradukaĵoj, en kiu pluraj veteranaj esperantistoj provlegis kaj helpis plibonigi la tradukaĵojn antaŭ publikigo. Mi tre ĝojas pri tio, ĉar mi bezonis nur mallongajn tempojn por redakti ilin. Mi bedaŭras, ke mi ne povis aranĝi tiajn grupetojn por aliaj tradukistoj.

– Mi estis ŝokita de la reagoj de kelkaj esperantistoj en 2013, kiam nia retejo startis. Ili akre kritikis la lingvonivelon de la retejo, sed ne proponis helpojn. Kritikoj estas bonvenaj, sed konkretaj helpoj estas pli bonvenaj.

Fine de novembro 2017 Vastalto anoncis, ke li devas forlasi la redaktoran taskon ĉe *Global Voices*, ĉar li intertempe iĝis estrarano de Japana Esperanto-Instituto kaj aniĝis en la teamo kiu kompilas novan Japanan-Esperantan vortaron.

Lian lokon kiel ĉefa redaktoro konsentis preni Steven BREWER, kiu konas la projekton de multaj jaroj kaj jam de kelka tempo estis kunredaktoro.

– Mi frue ekkonis la komunumon kaj komencis partopreni neformale. Sed ili malmulte interesiĝis pri Esperanto kaj ne interesiĝis pri ajna formala kunlaboro. En 2006, post la sukceso de "Blogo-Tago", en kiu 1 300 blogistoj partoprenis, mi ekhavis la ideon ke blogistoj verku dulingvan afiŝon por Esperanto-Tago kiu tuŝu lingvajn problemojn en ilia loka komunumo. Kun la helpo de aliaj aktivuloj, mi ekvarbis blogistojn kiuj verku ion.

– En tiu momento, mi kontaktis Ethan ZUCKERMAN denove kaj proponis al li ke mi verku serion de kvar dulingvaj afiŝoj por *Global Voices* por prezenti la Esperanto-komunumon kaj diskonigi informojn pri la Esperanto-taga evento. Mi verkis kvar afiŝojn: *Esperanto-Tago*, *Vojaĝo tra Esperantujo*, *Esperantujo tra bildoj* kaj *La Esperanta fenestro fermiĝas*. Intervjuis min ankaŭ *Libera Folio*.



– Je Esperanto-tago 2006, proksimume 50 blogistoj partoprenis. Ĝi postulis grandegan laboron por iom magra rezulto. En tiu momento, *Global Voices* ankoraŭ ne interesiĝis pri Esperanto, la bloga fenomeno komencis

eksmodiĝi, kaj mi decidis ekdediĉi min en aliaj direktoj. Mi ne partoprenis *Global Voices* dum 5-6 jaroj kaj nur poste eksciis, ke ili decidis subteni Esperantan version. Bonŝance, en tiu momento Vastalto atentis.

Kial vi opinias la projekton grava?

– La celoj de *Global Voices* estas tute samaj kiel la interna ideo de Esperanto. Legu la manifeston. Tamen, la kreintoj de *Global Voices* decidis konstrui sian projekton surbaze de tradukado, kiu estas laborpostula kaj malperfekta. Malgraŭ tio, mi kredas ke estas grave ke Esperanto restu parto de ĝi. Tra engaĝiĝo, *Global Voices* eble povos ekkonscii, ke per Esperanto eblas pli vere plenumi la celojn al kiu ili nur aspiras. Mia celo estas klerigi la redakcion, sed ankaŭ la homaron ĝenerale, pri Esperanto kiel vivanta

fenomeno. Per nia partopreno, ni montras ke Esperanto ekzistas kaj eblas.

Sed kial esperantistoj dediĉu laboron al tradukado de anglalingvaj artikoloj al Esperanto? Kial ne anstataŭe verki en Esperanto interesajn artikolojn, kiuj estu tradukitaj al la angla kaj aliaj lingvoj?

– Per nia partopreno, ni povas montri ke Esperanto funkcias. Kaj ke ĝin subtenas vigla kaj disa komunumo. Kiu, tamen, ne estas tre vasta. Esperantistoj komprenu la skalon: Estas jam 600 homoj kiuj tradukas el la angla al diversaj aliaj lingvoj. Ĉu ni povus trovi 600 homojn je nia flanko? Kiel mi diris, mia celo vere estas informadi pri Esperanto, simple per bona, profesia laboro kadre de la projekto. Sed mi konsentas ke dua etapo estus helpi ilin rekoni ke ekzistas interesa enhavo en la Esperanto-komunumo.

Kiel vi volus evoluigi la projekton, kiajn artikolojn vi volus prioritatigi?

– Oni jam konstatas ĉe *Global Voices* ke la laboro de redaktoro estas tro peza por unu persono. La redakcio volas evoluigi por ĉiu lingvo tri-homan teamon. Estu varbisto, kiu serĉos kaj allogos novajn tradukistojn; antaŭenigisto, kiu traktos la soci-retan laboron; kaj redaktoro, kiu prizorgos nur la tradukojn kaj afiŝojn.

– Sed ĉi-momente, mi simple devas ekkoni la novan komunumon kaj ties komunkilojn. Mi scias ke Vastalto iom suferis pro la bezono uzi tiel multe la anglan kun la aliaj redaktoroj. Mi esperas ke mia kapablo senpere uzi la anglan ebligos al mi kunlabori pli proksime.

Kian helpon vi bezonus por povi bone realigi tion kion vi volas fari?

– Mi invitas homojn kiuj volas fariĝi tradukistoj bonvole aliĝi en la retejo. Ni ege bezonas pli da aktivaj tradukistoj por montri ke Esperanto estas vivanta lingvo. Mi ankaŭ baldaŭ serĉos homojn kiuj pretas kunlabori por varbi kaj gvidi novajn tradukistojn kaj por fari la soci-retumadon. Mi volas mem lerni kiel ĉio

funkcias.

– Mi tamen ja bezonas helpon je unu alia gravega tasko: por danki sufiĉe al Vastalto ke li tiom longe laboris por ke ĉi tiu projekto ne malaperu. Mi nur nun konstatas kiom da laboro li vere faris, ne nur por redakti artikolojn, sed por konsili la novajn tradukistojn, konstrui la gvidilojn kaj help-paĝojn, ktp. Estas apendaŭ kredeble. Bis!

Libera Folio





Aleksej Nikolajevič Tolstoj

Aleksej Nikolajevič Tolstoj (10-a de januaro 1883 - 23-a de februaro 1945), rusa verkisto.

En Esperanto aperis: *Aelita aŭ la Marso formortanta; La morto de Danton; Nina*.


Vikipedio

Annette von DROSTE-HÜLSHOFF

Annette von Droste-Hülshoff, aŭ plennome: Anna Elisabeth FREIN VON DROSTE ZU VON DROSTE-HÜLSHOFF (naskiĝis la 10-an de januaro 1797; mortis la 24-an de majo 1848 en *Meersburg*) estis germana verkistino.

En Esperanto aperis: *La fago de la judoj*.

Vikipedio



Wiesław KAZANECKI

Wiesław KAZANECKI [WJEsűaf kazaNEcki] (nask. la 10-an de januaro 1939 en Bjalistoko, mortis la 1-an de februaro 1989 en Bjalistoko) estis pola poeto.

En Esperanto aperis: poemoj en *Podlaĥia Antologio*.

Vikipedio



Bildo de la tago

Coracias benghalensis benghalensis,
Barato.

Vikipedio